

& **Hamburgen:**

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 783 paŝoj dum 9 minutoj – se oni enlasas la multnomajn (en *kursiva* stilo) versojn. Verkis R. Korseti. (Originan melodion komponis Ĝ. Mole). La 59a universala kongreso de esperanto okazis en la libera kaj hansa urbo Hamburgo en jaro 1974. La elekto de nova estraro de UEA ne estis simple rutina proceduraĵo. Verko, kies nomindekso estas ĉi tie ekspluatata, detale priskribas la okazintaĵojn. La kanzono simple resumas tiun verkon. Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×27)+

(& Strofoj:

'1 /Hamburgen venis fine por batalo ; malbonaj fortoj kontraŭ sia malo.

'14 kaj vi ŝajne naiva esperantisto ; vi voĉdoninta por la kontraŭkristo

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'15 ĉu nia estas vi samideano ; aŭ kaŝe vi agentas por tirano?

'2 La bonon ja persone helpis dio ; kaj la malbonon Moskvo kaj Sofio,

'16 *Gete, Gonzales Aboin', Gorki, Grec' ; Rosa, Rel, Ribentrop, Regulo Percec'*

'3 sed pri graveco de la puĉ-amplekso ; vi povas tamen legi en indekso

'17 *Hilova, Adolf Hitler, Hektor Hodler ; Hog, Horak, Ĥruŝĉov, Incertov, Insbrucker.*

'4 de verko kiu kun aplomba kelko ; teoriumas pri la fina velko.

'18 Nu, pravis la japanaj policistoj ; akvomelonoj kaj esperantistoj

'5 *Albo', Aleksiev, Ambroĵ, Arafat' ; Pikel', Plat, Pul, Popoviĉ, Paŭer, Privat'.*

'19 ja saman havas ambaŭ la koloron ; sub verda ŝelo kaŝas ruĝan koron

'6 En Kremlo estis tre konata scio ; pro neŭtraleco de ĉi-asocio

'20 *Kaloĉaj, Kaŭcki, Kaŭamura, Kiljan ; Fermas, Viŝinski, Vitek, Vogt, Varengjan*

'7 ne povas laborista paradizo ; larĝiĝi ĝis Londono kaj Parizo,

'21 *Lejzeroviĉ, Lajbnic, Ljenin, Lion-Smit ; Ŝpur, Ŝustr, Tjeri', Tileman, Josip Tit'.*

'8 *Beker, Beethoven, Berman, Benaze' ; Borman Martin, Borman Verner kaj Burle'*

'22 Demandu: "Kial verdas via stelo?" ; Respondos komplotintoj sen ŝancelo:

'9 *Marks, Miĥalski, Milojeviĉ, Minaja ; Molotov, Moric: jen kunularo gaja,*

'23 "Ankoraŭ ne maturas ĉi-insigno, ; post maturiĝo ruĝos ĝi kun digno."

'10 kaj certe spite al burĝa logiko ; eĉ kunkomplotis la Pekina kliko

'24 *Sodjan-ruso', Ŝiler, Sekelji ; Svoboda, Sabo-Felŝe, Serdahelji*

'11 ĉar fortan emon sentis Maŭzedongo ; en Roterdamo ludi je pingpono,

'25 *Zonabend, Stalin kaj Step-Bovic kaj Stren ; Luin Franko, Luter Martin kaj amen'.*

'12 *Brant, Breĵnev Leonid, Burda, Burival' ; Konor, Korseti, Ĉiĉerin, Ĉoliĉ kaj Dal*

'26 Sed eble io misfunkciis en la plano ; de Moskvo, Beogrado kaj tirano

'13 *Dratver, Drezen, Dubĉek, Egami, Ajĥolc ; kun Ajĥhorn kaj Engels por fia negoc',*

'27 ĉar elektiĝis fine usonano ; neŭtrale iras plu la karavano.)